

E-LIBRO

JOSIP KOZARAC

SLAVONIA



ARBAR



**Tradukis:
Davor Klobučar**

KROATA
ESPERANTO-LIĜO



JOSIP KOZARAC

SLAVONIA
ARBARO

Tradukis:
Davor Klobučar

KROATA ESPERANTO-LIGO
2006



Lingva konsilanto:
Lucija Borčić

Grafika aranĝo:
Josip Pleadin

SLAVONIA ARBARO

Kiu almenaŭ unu fojon estis en tiu nia malnova arbaro, kun tiuj belegaj arboj, rektaj, puraj kaj altaj, kvazaŭ mulditaj, tiu neniam povas ĝin forgesi. Leviĝas tie grandiozaj kverkoj kies grizeta krusto estas kovrita per rektaj sulkoj, kiuj fluas laŭ la tuta dudek metrojn alta trunko kun forta kaj larĝa branĉaro, kiu ĝin kronas same kiel belkreskan junulon fela ĉapo. Fiere ili viciĝas unu apud la alia, kiel iamaj fortegaj soldatoj limgardaj, dum el tuta ilia figuro vi legas ke ili gigantas laŭ la forto, ke ili spitas ventegon kaj fulmon, kaj estas la plej fortaj kaj plej noblaj en sia regno kaj speco. Kaj kiam milda vento supre komencas bloveti, kaj malmola glata foliaro jen ekflustras, jen eksuras kaj ekmuĝas, tiam ŝajnas al vi ke petolaj feinoj slavoniaj ĉu kantadas en rapida senbrida rondodanco, ĉu tristavoĉe rakontas pri la ĉagrenoj kaj tristaĵoj el iu fora pasinta epoko – kaj tuj poste ekŝajnas al vi, ke vi aŭdas de supre grandiozan murmuron de preĝeja muziko. aŭ malgajan kortuŝan kanton ĉetomban... Kie la tero iom pli humidas, tie leviĝis svelta hela frakseno, kun blanka, ete brodita krusto kaj iomete kurba trunko, sur kies pinton sidiĝis travidebla branĉaro, kiel vualo sur vizaĝo de belulino. Tiel kokete ili staras kaj scivole kaj maltrankvile rigardas supren, ke vi povus diri ke ili estas elektitaj belulinoj de tiuj fieregaj rigidaj soldatoj... Jen kaj jen stariĝis ankaŭ nigra ulmo, rekta kiel fingro, kun etaj pendantaj junaj branĉoj kaj kirasa krusto, ĉiam iel malserena kaj malbonhumora, vera pesimisto kaj kaŝmaliculo... Tiuj tri arboj interbatalas por esti la ĉefa laŭ la forto kaj grando. Ĉi tie superas kverko, aliloke frakseno kaj ulmo – ili rolas same kiel leono kaj tigro en la regno de sovaĝaj bestoj...Kaj sub ili, aŭ inter ili, enpuŝiĝis

karpenoj kaj aceroj, larĝbranĉaj, tuberaĵoj kaj kriplaj – vi pensas ke vi vidas dorskurban serviston, kiu vindas kaj envolvas la piedojn de sia mastro, por ke ili ne malvarmiĝu. Estas tio arbaraj parioj, sklavoĵoj kiuj ekzistas nur por nutri kaj plifekundigi la teron al la alta kverko, kiu en sia orgojlo ne havas tempon por tiu bagatelaĵo...

Kiam ajn mi iris tra tiu arbaro, ĉiun fojon mi ion novan vidis, ion novan lernis; ne estas ĝi nigra, senvoĉa, morta, kia ĝi aspektas en la horizonto, sed ene spiras la vivo kaj mondo originala, natura, kie la naturo senkompare antaŭ viaj okuloj kreas kaj detruas, esploras kaj riparas. Por tiu, kiu ĝin trairas sen koro kaj emocio, restos ĝi certe senviva arbaro, aŭ pli ĝuste la spaco prireskita per arboj; sed kiu komprenas ĉiujn ĉi sekretajn voĉojn kiuj vivigas la arbaran spacon, kie delikata kanto miksiĝas kun antaŭmorta krio, kie milas diversaj sonoj kaj resonoj, jen etaj kaj altaj, jen grandaj kaj profundaj, jen karaj kaj agrablaj kiel iu muziko, jen doloraj kiel sopiro de kompatinda patrino – tiu kredos sin iel pli proksima al si mem, kaj al siaj propraj sentoj en tiu duonnokta, grandioza spaco.

Tio okazas tage. Sed nokte tiu spaco estas multe pli majesta, mistera kaj timiga; ĉiuj tiuj sonoj ripetigas tiam per dekobla forto, kaj igas viajn plej etajn nervojn tremi, dum en vi eĉ senvole naskiĝas kredo pri iu mistera, ĉiopova, superforta estaĵo, antaŭ kiu vi estas negrava etulo, senpova nulo... Nenio kapablas en la homo tiome vekti la senton, ke li estas senvalora kreaĵo kiel formiko kaj vermo, kiom povas unu soleca nokto en la arbaro...

Slavoniano ŝatas tiun sian kverkan arbaron pli ol ajnon; en ĝi li sentas sin esti hejme, li ne konas pli grandan ĝuon, ol estas senzorga migrado sub la ombroza kverkaro. Li konas ĉiun arbon, ĉiun birdon, ĉiun sonon; li kun tiu arbaro parolas kiel kun sia patrino. Por li ĝi ĉiam estis neelĉerpebla trezoro; li starigis somerlaborajn kromdometojn apud la arbaro kaj konstruis stalojn kaj fojnejojn, plantis frukto- kaj prunĝardenojn, kaj pli ofte li restas en la kromdometo, ol en la vilaĝo. Li fariĝis povra kaj trista, ekde kiam oni al li malpermesis kaj fermis

la arbaron; ĉar ĝi per sia herbaro paŝtigis liajn bovojn, per sia glano nutris la porkojn, per sia ligno starigis la domojn kaj barilojn, per sia gajlo ornamis la junulinojn ore kaj silke, kaj kiel granda ŝirmilo gardis la grenkampon kontraŭ fortaj kaj nordaj ventoj... Lupo, vulpo kaj mustelo donadis al li valoran felon, leporo kaj cervino dolĉan buŝplendon kaj agrablan distradon... Ja kiu ne ŝatus ĝin, kiu pri ĝi ne sopirus!...

Kun la jarsezonoj ŝanĝiĝas ankaŭ la arbaro kaj la tuta vivo en ĝi – plej enua ĝi estas printempe kaj somere. En printempo, kiam la tuta naturo reviviĝas, tiam la arbaro estas pleje malplena, pleje senviva. Kantbirdoj konstruis siajn nestojn ĉirkaŭ la vilaĝo, nur merlo kaj turdo restas en la arbaro, kaj kelkfoje en aŭroro ekbruas plengorĝe ilia glorkanto, kvazaŭ ili preĝus kaj dankus al tiu estaĵo, kiu sendis al ili la sunon por ilin varmigi, kaj vermon por ilin nutri... Kiam la suno iomete leviĝis, tuj ĉio denove eksilentas, ĉio kaŝiĝas por ne malkaŝi la neston kaj la idon. Nur de tempo al tempo aŭdiĝas laŭta akcipitra “pij-u-u-uk” el la nubaj altoj, dum sur la verda marĉo, tie meze de la vasta akvo vi vidas metale brilajn verdblujajn kapojn de sovaĝaj anasoj, kiuj singarde naĝas apud la karekso, senpacience atendente ke la femaloj elkovu kaj elkonduku el la karekso aron de dek ĝis dekkvin nigraj viglaj petoluletoj. Sed jen la akcipitro subite descendas sur ilin, kaj ili sagorapide forflugas supren, grupiĝas super la arbaro, kaj krozas proksime al la marĉo, ĝis la akcipitro malaperos for...

Tio estas la tuta printempa scenaro; krome estas ĉio malplena kaj enua – nur iu obtuza murmuro akompanas vin ĉie, sed vi ne scias kio ĝi estas kaj de kie ĝi venas, ĉar kien ajn vi turniĝas, la murmuron vi aŭdas same... Estas tio vekigo de ĝi, la spirito de la kosmo, la neniam ripozanta naturo, tiu per nenio haltigita instinkto de la eterna kreado kaj detruo; vi aŭdas ĝin pelanta la vivosukon sub la krusto, elpuŝanta la burĝonojn, malvolvanta la foliojn... Ŝajnas eĉ ke vi sentas ĝin kaj aŭdas ĝin interne, kie ĝi trairas tutan vian korpon kaj vekas novajn sentojn, novajn pensojn kaj instigojn.

Kiam aperas somero, jen en la arbaro de tago al tago ĉiam pli vigla kaj diversa panoramo! La arboj en plej densa verdaĵo, la naturo en kulmino de sia forto. Kien ajn vi rigardas, ĉio al vi diras: vivo! vivo! ho, kiel belas kaj dolĉas tiu vivo!... Kaj la birdoj, kaj la terbestoj ekmoviĝas; junaj turdoj rigardas vin scivole kaj mirante, ne konante ankoraŭ la timon – nur post admono de la pli aĝaj ili kunpremiĝas kaj kuntiriĝas, farante sin nevideblaj malantaŭ la branĉoj kaj folioj...

Trans la vojo ensaltis en malpermesitan arbareton juna leporo, kaj kiu en la arbareto atendas ĝis vespero, tiu eble vidos ke cervino singarde kaj facilmove saltetas laŭ rekta linio, kaj veninte al eta senarbejo ŝi ekblekas unu fojon, du fojojn, kaj el iu arbusto elsaltas du junaj ruĝaj cervidoj kun blankaj makuletoj sur ripoj, kaj ek! la unua unuflanken, la dua kontraŭflanken, kaj suĉu, suĉu, momenton aŭ du, kaj urĝe saltu reen al la arbusto, dum la patrino forsaltas alidirekten, kaj jen ĉiuj malaperis kvazaŭ neniam ekzistintaj... Vi nur turnas vin ien-tien kaj frotas la okulojn, ne kredante al si mem, ĉu tio estis sonĝo aŭ realo...

Kaj tie pinte de la alta ulmo konstruis aglo grandegan neston; jam dek jarojn ĝi loĝas tie kaj ĝis nun neniu povis ĝin rimarki; sed ĉi jare ĝi komencis tro impertinente rabi anasojn kaj anserojn ĉirkaŭ la sezondometoj, sed la loĝantoj gvatis kaj embuskis, ĝis finfine post granda peno ili trovis ĝian neston. Ni konsentis ke la junajn aglojn ni elprenos, aŭ pafite mortigos; tamen sukcesis nenio: la ulmo estis alta kaj sen branĉoj, do ne eblis grimpi al la pinto. Kaj la nesto estis tro dense konstruita, tiel ke kuglo ne povis ĝin penetri. Ne restis alia ebleco, ol subhaki kaj faligi la ulmon – du homoj hakadis la dikan arbon, dum du aliaj atendis kun pafiloj. Proksimume meze de la laboro alflugis maljuna aglego kun predo en la ungegoj, mi pafis, ĝi elĵetis la predon kaj vundita forflugis malalte kaj rekte kiel sago en la arbaron. Sed kion ĝi havis en la ungegoj? Estis tio juna senplumigita akcipitro, kiu verŝajne apenaŭ elflugis el la nesto, kaj ie kaŝita kaj malsata atendis sian patrinon, ke ŝi alportu manĝaĵon. Sed, anstataŭ ŝi, venis

la impeta parenco, forprenis ĝin kaj destinis ĝin al sia ido por manĝo – ne sciante ke sub la propra nesto ankaŭ ĝin kaj ĝian idon atendas la morto. Kio estas tio? Ĉu hazardo, sorto, natura leĝo kaj ordo?

Necesis du horoj por faligi la ulmon; dum tiu tempo senĉese alflugadis du sturnoj al la agla nesto, malaperante interne kaj tuj denove elfugante. Ni opiniis ke la sturnoj serĉas en la nesto pecetojn de viando tie disĵetitajn, aŭ ĉasas tie muŝojn, kiuj kutimas flugi apud malbonodora nesto; sed kiam la ulmo falis, ni vidis ke la vero estis alia. La pinto de la ulmo estis plenan metron pli alte ol la nesto, estis seka kaj kava, kaj en tiu kavo havis la sturno siajn idojn. Kiam la tridekkvinmetra ulmo falis, ni trovis du junajn sturnojn vivajn, dum aliaj du, samkiel la juna aglo (estis nur unu, kaj jam granda) restis pro granda falo kaj frapo surloke mortaj.

Kion tiuj du birdoj, kovante kaj nutrante unu apud la alia siajn idojn, pensis unu pri la alia? La sturno certe sentis la protekton fare de sia fortega kunloĝanto – certe ne konjektis la kompatinda, kiel multe ĝin tiu protekto kostos... Kaj la zorgema kaj bona patrino naturo, kiu al ambaŭ donis komfortan neston, tiu al ambaŭ destinis samtempan morton, sen larmo, sen kompatato, nur por konservi per sia nesciebla saĝo la ekvilibron inter tiom multaj vivuloj kiujn ĝi estas kreinta...

En tiu sezono, je la Sankta Elija-tago, oni ĉaspafas junajn sovaĝajn anasojn, kiuj tiam komencas flugi; en tiu ĉasado oni devas ĝistalie stari en akvo kaj karekso, kaj dum unuj ĉasantoj marŝas tra la akvo pelante kaj pafante, la aliaj trafalĉas larĝan koridoron en la karekso, kaj en tiu loko atendas la anasojn, fuĝantajn for de la pelantoj. La pafado daŭras ade kaj ade; estas tio unu el la plej viglaj ĉasoj, dum kiu oni multe pli da pulvo kaj plumbo forpafas, ol la pafitaj anasoj valoras. Kelkaj homoj havas ankaŭ hundojn, kiuj mem kaptas junajn birdojn flugolernajn, kaj portas ilin vivajn al la ĉasantoj... Dume oni kaptas kelkajn karpojn aŭ ezokojn, kaj kiam la ĉasantoj sin revestis kaj deŝiris de si hirudojn, la karmo jam estas salumita kaj fritita super karbo, kaj la konata brulodoro de fiŝo kaj salo disvastiĝas tra la tuta

ĉirkaŭaĵo, tiklante per nerezistebla forto la stomakojn, malsatiĝintajn en la akvo...

La plej granda problemo somere en la arbaro estas kuloj. Vi povas nek ripozi, nek peceton da pano engluti, nek glason da akvo eltrinki – ĉar post via plej eta halto ili tuj venas centope, zumante kaj fajfante ĉirkaŭ vi, kaj vi povas mansvingi defende kiom ajn vi volas, ĉio estas vana, ĉar ili elpikos kaj elmordos vin ĝis frenezo. Ĉio tiam fuĝas el la arbaro – sovaĝaj bestoj, bovoj, homoj – la bovoj ofte tiel freneze kuregas laŭ la kampoj kaj paŝtejoj, fuĝante for de la muŝoj kaj kuloj, ke apenaŭ oni povas ilin haltigi. Ne estas pli granda turmento kaj puno ol somera tranokto en la arbaro – kaj la sorto decidis ke pro oficiala taksado de arboj mi dum ses semajnoj tranoktu en la arbaro... Tiujn ses semajnojn mi neniam forgesos! Da laboro estis multe, kaj ĝuste ie meze de la arbaro, do estis nek domo, nek vilaĝo en la proksimo. Ni decidis tranoktadi en kabano, kiu restis post la laboristoj, kiuj ĉi tie pasintvintre hakis kaj prilaboris arbojn... Estis mi, du arbaristoj, unu laboristo kaj la kabana prizorganto Bartol, kiu por ni preparadis manĝojn. Ankaŭ tiu manĝaĵo kaŭzis turmentegon; la viando ne povis pro la varmego eĉ unu tagon konserviĝi, tial ni aĉetis amason da kokidoj, faris por ili korteton, kaj buĉis tagon post tago tiujn maldikajn kokidojn kiuj mortsuferis pro la varmo, same kiel ni...

Ne ekzistas pli pena laboro, ol estas tia arbara taksado. Vi devas samtempe streĉi ankaŭ ĉiujn viajn animajn fortojn, observante arbon post arbo, mezurante ĝian altecon, konsiderante la videblajn kaj nevideblajn mankojn kaj notante ĝian valoron en difinitan tabelon. Krome vi devas ĉiun arbon kontroli de ĉiu flanko, kaj senĉese rigardi supren, stumblante jen kontraŭ ŝtipoj, jen kontraŭ dornaro, kiu vin senkompatate gratas kaj skrapas. Sed ĉion ĉi oni facile neglektus, se nur ne estus tiom neeltenebla la varmego, kiu sin sterniĝis inter la branĉoj kaj la tero, kaj kiu, manke de eĉ plej facila venteto, tuj transformas al fajro vian jam tro ardan bruston kaj frunton. Kaj krome tiuj furiozaj

kuloj, kiuj ne permesas al vi eĉ momentan halton kaj ripozon – kien vi, tien ankaŭ ili, kvazaŭ uzuristoj, kvazaŭ almozuloj, zumante kaj petegante vin pri guteto da via sango... Laca, kun dolora korpo kaj frapitaj piedoj, vi apenaŭ atendas ke vesperiĝu, ke vi ekriposu, sed malprave, ĉar viaj turmentoj vere komenciĝas tiam! Vane malheliĝis, da vento ne estas eĉ por unu polveron movi, la varmego daŭre kreskas, kaj ĉiam pli grandaj aroj da kuloj zumas ĉirkaŭ vi... Kien kuŝiĝi? En la kabano brulas fajro, estas fumo, tie ne estas kuloj, sed estas varmego kiel en forno, venanta parte de la fajro, parte de la malalta ligna tegmento, en kiun dum la tuta longa tago sendis la suno sian varmon... El vi fluas ŝvito, malseka vi estas de la kapo ĝis la kalkano; ĉemizo, pantalono, ĉio nur gluiĝas al vi; vi turnas la korpon serĉante ĉie nur spireton da freŝa malvarma aero, sed ĝi troveblas nenie, kaj vi en malespero eliras kaj ĵetas vin freneze al la tero... Tie la varmo iom malplias, sed zumas kaj pikas la kulo, jen la orelon, jen la fingrojn, kaj vi skuigiĝas aŭ vin kovras, tamen vane, ĉar antaŭ ĝi vi ne povas vin kaŝi, ĝi trovas eĉ plej etan truon, ĝi trapikas eĉ plej dikan surŝtrumpon, resume – ĝi atakis vin fanatike: morto aŭ vivo... Tiel vi suferas tutnokte, viaj okuloj ŝvelas, via forto forvelkas, kaj ajnan trezoron vi donus, por povi nur momenton dormi! Tamen la vera dormo ne aperas, kaj vi klopodas pensi pri ajna afero, por distriĝi kaj forgesi ĉi turmentejon, sed ankaŭ tiel vi sukcesas nur maldorme dormi, dorme maldormi...

Finfine ekaŭroris, kaj ni kun peza kapo, kvazaŭ ebriaj, salte ekstaras kaj salutas la di-benitan tagon, preparas nin por labori, forkurante por ŝanĝi unu turmentejon per la alia.

- Almenaŭ Bartol faru al ni bonan tagmanĝon!- sopiris mi ĉe la ekiro.

- Ne havu zorgojn, sinjoro, sperta kuiristo mi estas...

- Nur atentu, Bartol, ke ni ne komparu vin kun iu kuiristo, kiu sinlaŭde diris, ke dum tri jaroj li preparadis manĝojn por porkoj, kaj tiuj neniam plendis kontraŭ ili... – diris unu el la arbaristoj.

- Unue provu, kaj poste parolu!- respondis Bartol, iomete

ofendita.

Kaj en la matena duonhelo apenaŭ rimarkante kverkojn, ni jam migras ŝancele de arbo al arbo, etendante niajn membrojn, kaj tiaj, aĉe dormintaj, ni mortfalis pro laco kaj malsato jam je la naŭa horo, kaj apenaŭ tiris nin ĝis la kabano.

- Finita la manĝo, Bartol?

- Finita, sinjoro!

Ni sidiĝas, Bartol metas antaŭ nin tri kulerojn, kaj metalan pladon kun paprikaŝo* el kokidoj; ni kaptas la kulerojn kaj ekprenas el la plado, sed jen la paprikaŝo nigra kiel inko.

- Je Dio unika, kio estas tio, Bartol?...

Rigardas Bartol tute konfuza, sed vorteton eĉ ne kapablas respondi.

- Ĉu vi bone lavis la pladon?

- Jes!

- Tro da cepo vi enmetis?

- Ne!

- Do kial ĝi nigras?

- Nur Dio la sankta scias, kaj al mi tio ne okazis dum la tuta vivo - veadis Bartol.

Kion nun? Senvorte ni rigardas unu la alian, kiel tri kondamnitoj; unu tamen metis la kuleron al la buŝo.

- Ne malbone, la paprikaŝo estas bona.

Ankaŭ la dua arbaristo provas.

- Je Dio kaj animo, bona, manĝebla...

Kaj la paprikaŝo vere estis bona, nur nigra, sed kial nigra, tion ni ne povis diveni.

Por la vespermanĝo kompreneble denove paprikaŝo, sed ni ripetegis al Bartol, ke li devas ĉion bone lavi. Fine ni venis vespermanĝi,

* paprikaŝo = maldensa stufaĵo el viandpecetoj, foje kun terpomoj aŭ pastsaĵo, kuirita kun papriko aŭ cepo (simila al gulaŝo).

sed Bartol staras apud la paprikaŝo kvazaŭ senbranĉigita karpeno, kaj skuas la kapon kaj veas.

- Jen mi vere lavegis, kiom ajn mi povis...

- Ja kio? Ĉu denove nigra?

- Nigra, kiel antaŭtagmeze!...

Ĝi nigra, sed ni malstaj, tial ni formanĝis, sen plua intereso pri la kialo... Morgaŭ ni venis iom pli frue al la kabano, kiam Bartol ankoraŭ ne finis la laboron. Iomete mi rigardis kiel li kuiras, kaj tuj la sekreto malkovriĝis! Bartol kovris la pladon per kverka breto kaj kiam la paprikaŝo bolis, tiam la varmega akvo eligis el la kverkaĵo taninon – kaj tiu nigras kiel inko... Tiel saviĝis lia kuirista reputacio, kaj niaj stomakoj al eĉ pli granda apetito kuraĝiĝis...

Sabate vespere ni iradis hejmen, kaj lunde matene denove en la arbaron – kaj tiel sesfoje sinsekve. Dum tiuj ses semajnoj ni ofte pluve malsekis ĝishaŭte, multe staradis en aĉodora marĉo kaj en ŝlimo ĝistalie, la piedojn ni tro lacigis kaj kaligis – sed malgraŭ ĉio restis ni sanaj kiel ŝtono silika... Unu tagon ĉirkaŭ la tagmezo, ni fintaksis la lastan 10.665-an kverkon kaj tiam la laboristo entranĉis en ĝi krucon, kaj ni ekkantis “Gloron al Dio en la altoj”...

“Tiu dekunu milo donos al mi mian pension”, sopiris la maljuna arbaristo. –Kredu al mi, sinjoro, dum dudek jaroj gardante ĉi arbaron mi ne malbenis ĝin tiom, kiom en la lastaj ses semajnoj. Se mi ne estus oficisto, ne farus mi tiun laboron eĉ kontraŭ dudek forintoj tage.

En la vizaĝo de la pli juna arbaristo videblis, ke li verŝajne plene konsentas kun la maljunulo, sed ke eĉ pli li konsentus kun ties emeritiĝo...

Meze de septembro komenciĝas grava sezono en la slavonia arbaro. Arbaraj komercistoj venas kaj retaksas tiujn partojn, kiujn ni taksis somere, kaj kiuj vintre estos vendataj; alrapidis ili el ĉiuj partoj de Eŭropo, kaj la vendotaj kverkoj estas markitaj per ĉiuspecaj signoj: blanka, ruĝa, blua kreto, kruceto, cirklo, trianguloj ktp. Ĉiu

komercisto havas propran signon. Krom tiuj riĉuloj, vidas vi ankaŭ niajn Turopolje-anojn, kiuj po duope migras tra la arbaro kaj taksas la rikolton de la glanoj. Dum estis ĉie iom da kverka arbaro, la glano havis nur lokan valoron, sed de kiam etaj bienuloj forhakis siajn arbarojn, saltis supren la prezo de la kverka ligno kaj glano. Krom arbaristoj, malmultaj homoj scias ke el ĉiuj fruktoj preskaŭ neniu havas tiom da utilo, kiom la glano. Ĉiuj hejmaj kaj sovaĝaj bestoj avide baraktas pri ĝi; de eta muso ĝis granda bovo, ĉiuj senpacience strebas al ĝi. Per ĝi dikiĝas porkoj, kaj ankaŭ cervoj; meleagroj, kaj ankaŭ sovaĝaj kolomboj kaj anasoj. Lastatempe ĝi uzatas kiel surogato por kafo (cikorio), kaj tiucele oni sekigas ĝin en specialaj dometoj, same kiel prunojn. Tia seka glano longe daŭras, male al la freŝa, kiu rapide fuŝiĝas kaj ekputras, kaj tiam utilas neniom. La glana kafo estas rekomendata al malsanuloj, ekzemple skrofolaj ktp.

Ĉar la glano havas multajn konsistaĵojn, certe la kemio trovos multajn novajn uzojn de tiu eksterordinara frukto de niaj arbaroj. Fine de septembro, kiam la glano komencas maturiĝi, ho kioma vivo en la arbaro, vi povus diri, ke vi estas en vinberejo! Multkoloraj garoloj flugas maltrankvile kaj gaje, krias kontraŭ vi, spitante al vi kaj per sia bruo, kaj per siaj korpomovoj, kaj krome ili konstante portas glanon, kaŝante ĝin por vintro en ĉiun kavernon, kiun ajn ili trovas. Tute diverse, silente kaj pace, kvazaŭ elkreskintaj el la branĉoj, sidas centoj da kolomboj sur plej altaj arbopintoj, kaj vi kun tuta via atento kaj ruzo proksimiĝas al ili – sed ĉio vana, ĉar tuj kiam vi levas la pafilon, ili leviĝas kun granda bruo supren, ĉirkaŭflugas kelkfoje la kverkaron kaj denove singarde sidiĝas, kie al ili plaĉas... Tio estas unu el plej timemaj birdoj, kaj la poetoj kiuj poemas pri la kolomba delikateco ne ĝeniĝu en sia ekstazo, se mi diros ke estas malmultaj bestoj kiuj povas tiom rezistadi al pafila kuglo, kiom kolombo. Tiu, morte vundita, ankoraŭ forflugas ducent ĝis tricent paŝojn. Ankaŭ interesa estos la fakto, ke la kolombo per la sama gorĝo, kiu tiel “delikate kantas”, povas engluti eĉ plej grandan pecon da glano. Mi provis la glanon,

eltiritan el la stomako de iu pafita kolombo, denove puŝi tra ties gorĝo, sed tio absolute ne eblis... Dio nur scias, kiel ĝi tion faras! Dum vi kaŝe atendas kolombojn, okazas ne malofte ke antaŭ vin alsaltas rapidpiedaj cervinoj, kiuj nun arigās pro glanoj. Kiel vikle kaj ĉarme saltas ili antaŭ vi, je momento haltas, observas la ĉirkaŭon, kaj poste denove forsaltas pluen, mallaŭte kaj elaste, kvazaŭ ne tuŝante la teron. Tio estas certe unu el la plej belaj bestoj, kiujn la naturo kreis!

Oktobre komenciĝas cervinĉasado; tamen en tiu monato ĝi ankoraŭ malfacilas. Nur en novembro, kiam la alta herbaro kuŝiĝas kaj la folioj defalas, venas la vera ĉasosezono. Vere estas ĝuo dum malvarma mateno stari en koridoro inter malalta juna arbaro kaj la alta maljuna, kiam en la arbareto ekbojas komence nur unu hundo hao-hao-hao! kaj tiam aliĝas la dua, kaj la tria, unu per alta voĉo, la alia per la malalta, kaj vi tremas kvazaŭ febre, aŭskultante kien ili kuras. Subite vi komprenas ke ili iras rekte al vi, la pafilo en viaj manoj aŭtomate leviĝas al via vango; jen aŭdiĝas susuro de folioj kaj branĉoj, vi ekrigardas tien, kaj tuj aperas antaŭ vi cervino – belega kaj kara, rigardante vin treme, kiel hontema junulino en banĉambro. Vi jam ĉesas esti ĉasisto, la vidaĵo vin superregas, vi forgesas kaj vin kaj la pafilon, ĝojebria gapante al ŝi, kvazaŭ al iu fatamorgano. Tiam ŝi eksaltas kaj, ne kurante, sed ŝajne flugante, malaperas en arbustoj, kaj vi nur laŭ ŝia blanka postaĵo vidas ke ŝi leviĝas kaj malleviĝas, kaj fine malaperas en la densa arbustaro. Sed jen alkuras la hundoj laŭ ŝiaj spuroj, kvazaŭ tirataj per fadeno, bojegante kaj saltante unu trans la alian, dezirante meza de la forta pasio de ĉasado esti la unua... Vi nur nun vekigās, nur nun rememoras ke la pafilo enmanas, sed jam estas tro malfrue, kaj al vi iu gaja-amara sento riproĉas, ke vi ne plenumis la ĉasistan devon. Tiam malantaŭ vi ektondras du pafiloj, unu post la alia, kaj la voĉoj: hop-hop! klarigas al vi ke la cervino falis...

Vi iras tien kaj vidas ŝin kuŝanta – kara kaj bela kiel antaŭe, sed morta... Vi eĉ senintence demandas vin, kie estas tiu forto, tiu io, kiu pelis ŝin trans la arbustoj, kien tio malaperis tiom rapide?!

Ĉu tiu kvanteto da sango, kiun la hundoj avide lekas, ĉu ĝi signifas la vivon? Ho! kompatinda kaj malforta estas tiu dolĉa vivo, por kiu vi tiom suferas kaj turmentiĝas, por kiu vi donas ĉiun trezoron de la mondo – kaj jen! de kio ĝi dependas: malgranda plumba kuglo kaj guto da sango!... Kaj dum vi ŝin tiel rigardas, ŝajnas ke ŝiaj grandaj belaj okuloj rigardas vin kaj demandas: Pri kio mi kulpas, ĉu mi tion meritis de vi?... Kaj vi al ŝi volonte pardonpetus, volonte vi dirus por konsolo: Kion mi povas, kara mia? Ne estas mi kulpa, estas tio la sorto, tiel devas esti – kontraŭ tio senpovas kaj vi, kaj mi, kaj ĉiu – nur siamaniere...

En tiu jarsezono oni semas la glanon: kiom da maljuna arbaro oni forhakis, tiom da juna oni devas semi. Al tiu laboro eliras tuta vilaĝo, ĉiu generacio klopodas perlabori por vintro kelkan moneron pli. Dum la semado viciĝas la laboristoj, kvardek ĝis sesdek en unu vicon. Rigardante de malproksime, kiel kvin aŭ ses tiaj vicoj moviĝas, ŝajne vi vidas vivan barilon, kiu inerte moviĝas antaŭen. Kutime kuniĝas junulinoj en unu vicon, kaj tiam la kantado kaj petolaj krioj sonas tra la tuta arbaro. Kaj dum ĉi tie kun kanto la nova arbara generacio naskiĝas, aliloke triste defalas flava folio, plorante kaj renversiĝante tra la aero, ĝis la patrino tero denove akceptas ĝin en sian molan kaj varman sinon... Kaj iomete pli malproksime denove batas la hakilo kontraŭ la kverkan korpon, por dum unu horo faligi tion, kio kreskadis dum ducent jaroj! Tiel do en la sama momento – ĉi tie la morto, kaj aliloke la vivo naskiĝas. Mian koron neniuj tombejoj tiom tuŝis, kiom tiu arbara forhakejo, kun kuŝantaj kaj difektitaj trunkoj, sub kiuj mi antaŭ unu monato promenis kaj ĉasis, kontraŭ pluvo min ŝirmis kaj en gaja societo apud la fajro ĝuis glaseton da vino... Kaj nun! Ligneroj, branĉoj, trunkoj, ŝtupoj, stumpoj – ĉio kuŝanta unu trans alia, kvazaŭ masakrita korpo! Centoj da laboristoj frapas kaj batas tie per martelo kaj hakilo, centoj da ĉaroj kaj sledoj ŝoviĝas inter la branĉoj kaj stumpoj, enŝarĝante la glate kaj rekte ĉarpentitan lignon, por ĝin transporti al la rivero Sava. Via animo ekfrostas, kiam vi vidas

tiun malplenan, kvazaŭ dum unu nokto dezertigitan arbaran spacon; kien tioma kverkaro malaperis, kien tioma varo transportiĝas? Nun, ĉe la propra malapero, lasas la arbaro heredaĵon al tiuj, kiuj ĝin flegis kaj gardis. Krom la kvindek forintoj, kiujn la posedanto ricevas por ĉiu kverko, mencias mi nur tion, kion la popolo rekte en la manojn ricevas: Oni produktas jare ĝis kvindek milionoj da tabuloj, el ĉiu milo oni pagas por la prilaboro kaj forveturo tridek forintojn, aŭ sume milionon kaj duonon da forintoj. El tiu sumo apartenas al Primorjeanoj kaj slovenoj du, kaj al la loka loĝantaro unu triono. Tiun signifan sumon donas la kverka arbaro al sia popolo tuj antaŭ la propra morto, kaj kiom ja multe ĝi jam dum sia ducentjara vivo donis! Jam en la plej frua junaĝo, estante dek- aŭ dekkvinjara, donas ĝi taninon necesan por prilaboro de ledo (la saman, kiu nian paprikaŝon tiel malplaĉe kolorigis); la taninon produktas nun el lignaj kverkaj restaĵoj du grandegaj fabrikoj, unu en Županja (Ĵupanja), la alia en Mitrovica... Ekde sia sesdeka jaro donis ĝi aregon da glano kaj gajlo, konstruis multon da domoj kaj ŝipoj... Kiu ja povus elnombri ĉiujn fabrikistojn, kiuj volas la kverkan lignon! Volas ĝin la maristo, por ke ĝi rezistu per sia firmeco kontraŭ terura mara ventego; volas ĝin ĉiu ordinara homo, por sian domon konstrui, ĉar sub ĝi li estas pleje sekura; volas ĝin la vinberisto, por meti en ĝin unu el la plej noblaj donacoj de Dio, la ruĝan vinon, por ke ĝi brilajn homajn spiritojn al pli gloraj agoj instigu kaj kuraĝigu; volas ĝin finfine la homo mortonta, por en la kverka ĉerko havigi la lastan ripozejon al sia kara forpasinto...

Tial, kiam ajn mi pasas tra tiu grandaĝa kverka arbaro, ĉiun fojon vekigis en mi mil emocioj kaj pensoj, pri tio kio okazis en ĝi dum tiuj ducent jaroj!... En ĝia ombro atendis karulo sian karulinon, en ĝia krepusko kaŝe atendis mortigisto sian viktimon, en ĝia arbustaro estiĝis sekretaj planoj, en arabaj kavoj kaŝiĝis mortigpova pafilo kaj ŝtelita trezoro... Ne estas arbo kiu ne sciis almenaŭ unu sekreton prezenti; ne estas homa pasio, kiu en tiu malhelo ne montriĝis... Kiam ajn mi pasas tra tiu arbaro, ankaŭ sur mian koron falas tiu magia kaj

mistera trankvilo, kiu tamen parolas en cent lingvoj, kaj rakontas mil teruraĵojn kaj belaĵojn, tiel ke mia koro ĉesas bati, kaj en la animo mi eksentas min je unu paŝo pli proksima al tiu granda estaĵo, kies spuron la homa spirito vane sopiras trovi...

Slavonio: en PIV malĝuste difinita kiel malnova nomo por Kroatio, sed vere ĝi estas unu el la kroatiaj regionoj, relative granda. Ĝi situas nordoriente en Kroatio, inter la riveroj Danubo (oriente), Drava (norde), Sava (sude) kaj Ilova (okcidente). Krom kelkaj malaltaj montoj, estas tie Panonia ebenaĵo. Slavonio estas preskaŭ sinonimo por ebena lando, fekunda, terkultura, riĉa kaj kun diligentaj homoj kaj gaja kanto. Slavonianoj estas nacie en granda plimulto kroatoj. La ĉefa urbo en Slavonio estas Osijek.

Slavonia arbaro: en antikva tempo estis Slavonio preskaŭ kovrita per arbaroj. Sed la kresko de la civilizo kaŭzis ke la arbara surfaco iĝis ĉiam malpli granda. La ĉefa arbo en tiuj arbaroj estas kverko, fakte ĝia speco *quercus robur* (kroate: luĵnjak). La kvalito de la slavonia kverko estas eble la plej alta en la mondo. Ĝia intensa industria uzado kaj kresko de urboj, vilaĝoj kaj grenaj kampoj ekde la fino de la 19-a jarcento kaŭzis pluan perdiĝon de la arbaroj, tiel ke jam restis malmultaj. Oni iom batalas kontraŭ tio per plantado de novaj arboj, sed por ilia kresko necesas multa tempo.

JOSIP KOZARAC



Josip Kozarac (Vinkovci, 1858 – Koprivnica, 1906), kroata verkisto. Studis arbarkulturon en Vieno. Profesie ĉiam ligita al arbaroj. Bona konanto de la vivo, moralo kaj psikologio de slavonia vilaĝano, ofte volis helpi al li konsile. Li mallaŭdis lian senzorgemon kaj nekonstantecon, kaj favoris la vilaĝon kontraŭ la urbo, dezirante ke homoj ne fuĝu el la vilaĝoj al la falsa “sinjoreca” vivo en la urboj, sed ke ili restu, kaj vivu racie kaj sen troa lukso. Kozarac verkis multajn novelojn (“Tena”, “Slavonia arbaro”, “Mia avo”, “Tri tagoj ĉe la filo”), kelkajn romanojn (“Mortaj kapitaloj”) ktp. La novelo “Slavonia arbaro” publikiĝis en 1888.

Ekzistas esperantaj tradukoj de la noveloj “Tena” (Josip Pleadin, 1984), kaj "Tri tagojn ĉe la filo" (en "La Zemuna Esperantisto" n-roj 27-29/1914, tradukita de Adam Šokčević).